

SCIENCA REVUO
Internacia Scienca
Asocio Esperantista
BEOGRAD (Jugoslavio)

El Vol. 25
n-ro 2/3 (106/7)
20.5.1974.

ADVERBOJ KAJ PSEŬDOADVERBOJ

(F. GARCIA BLÁZQUEZ, KARAKO, VENEZUELO)

Klariginte la ideojn pri la malsamaj funkcioj ekzistantaj en la oracio (1) utilas nun montri la ĉefajn diferencojn inter la konceptoj de la klasika terminologio kaj la konceptoj eksponitaj laŭlonge de ĉi tiu serio da artikoloj (2). Alivorte, oni indikas kiujn kontaktpunktojn havas la klasika koncepto de substantivo kun la nia, same kiuj estas la diferencoj inter nia koncepto pri adjektivo kaj la ĝis nun ĝenerale akceptita koncepto pri ĝi, kaj tiel plu. Ankaŭ ni devas eksponi kiel regroupiĝas la malsamaj klasoj kaj subklasoj de vortoj, ĉar kiel logika konsekvenco sekvas vario en la subklasifo.

La nevarieblaj "partoj de la oracio", nomataj ankaŭ partikuloj, estas vortspecoj prezentantaj pli da malfacilaĵoj por la studado. Efektive, ni vidu tion kion pensas Jespersen tiurilate:

"En preskaŭ ĉiuj gramatikoj adverboj, prepozicioj, konjunkcioj kaj interjekcioj estas pritraktataj kiel kvar malsamaj "parolpartoj", starigante sekve inter ili diferencon same kiel okazas kun substantivoj, adjektivoj, pronomoj kaj verboj. Sed ĉimaniere, la malsameco inter tiuj

vortoj estas ege troigata, kaj iliaj evidentaj similecoj obskurigitaj, kaj tial mi proponas reiri al la malnova terminologio, laŭ kiu tiuj kvar klasoj estas konsiderataj kiel "partikuloj". (3)

Evidente, estas troigo grupigi ĉitujn klasojn en unu solan, t.e. aljuĝi al ili unu saman funkcion. Interesas ĉitie koni iun kontraŭan opinion:

"Estas ŝajninta konvena grupigi en ĉitujn ĉapitron prepoziciojn, adverbojn kaj konjunkciojn pro la facileco per kiu ĉituj vortoj transformiĝas iuj en aliajn."

"El ĉituj reciproka interŝanĝo de oficoj inferencas ke estus pli bona redukti ĉitujn tri klasojn al unu sola. Estas esence malsamaj la oficoj de la adverbo, de la prepozicio, de la konjunkcio: la vorto kiu pasas de iu klaso al alia varias laŭ sintaksa funkcio kaj eĉ laŭ signifo; kaj ĉar ankaŭ okazas ke, laŭ tio ke oni uzas iun vorton kiel adverbon, prepozicion aŭ konjunkcion, al ĝi respondas diversaj ekvivalentoj en aliaj lingvoj; la partigo de ĉituj tri gramatikaj oficoj ne nur konvenas por ĝia taŭga uzado en kastilia (hispana), sed ankaŭ por faciligi la studon de aliaj lingvoj." (4)

Kaŭze de ĉituj konfuzo inter funkcioj de la malsamaj partikuloj, estiĝas pli kaj pli necesa fari kritikan studon de la klasifiko kaj difinoj de vortoj. Kie oni vidas la plej grandan anarkion de konceptoj estas ĉe la adverbo, kiu estas kvazaŭ iu "cindrulino", ĉar kiam oni ne scias kien enfakigi iun vorton oni ĝin klasifas kiel adverbon.

KRITIKO AL LA DIVERSAJ DIFINOJ

Efektive, al la origina funkcio de la adverbo laŭ la etimologia difino, la plej komuna, oni aldonis aliajn kiuj alinaturigas iel la esencon de ĉituj vortspeco. Ni estas realigontaj do, veran elsarkon inter la diversaj difinoj klopodante apliki tion pri "unu funkcio por ĉiu vortspeco kaj unu vortspeco por ĉiu funkcio".

Ni elmetos nun iomajn plej konatajn difinojn.

- 1) Vorto kiu akompanas la verbon (laŭ etimologia difino).
- 2) Vorto kiu modifas la verbon, la adjektivon aŭ alian adverbon (la plej disvastigita).
- 3) Nevariebla vorto esprimanta lokon, tempon aŭ manieron (PV).
- 4) Iu kvalifikanto de la verbo, aŭ de alia kvalifikanto, jen adjektivo, aŭ adverbo, aŭ kvalifika lokucio aŭ oracio, aŭ de verbaj nomoj (Webster).

Inter la malsamaj difinoj supre indikitaj, ni devus elekti unu kiu karakterizu la adverbos distingante ĝin el la aliaj vortspecoj.

La difino 1 estas tre primitiva, kaj permesas konfuzi verban komplementon kun adverbo, do ĝi ne estas akceptinda.

La difino 2 estas tro komplika; ververe ĝi reprezentas tri difinojn (5), oni ne povas ĝin akcepti entute.

La 3, pli ol difino estas klasifo de la adverboj, tial ankaŭ ĝi devas esti rifuzata (6).

La difino 4 intencas enteni la pli multon de la funkcioj kiuj nune estas aljuĝataj al la adverbo. Sed ĝi uzas metafore la koncepton "kvalifiki", kaj la uzo de metaforoj, t.e. de vortoj dusencaj, estas tute neakceptenda en science ellaborita difino.

TRASERĈO DE IU PLI TAŬGA DIFINO

Tial ke neniu el la konataj difinoj povas esti akceptata, ni provu, alimaniere listigante kaj ekzempligante la malsamajn adverbajn funkciojn, konsideri ĉefe difinojn 2 kaj 4.

I) Modifanto de verbo

a) *Hieraŭ* nokte ni iris al la teatro (cirkonstanco).

b) *Eble*, ni iros morgaŭ al la aeroporto (modalo).

II) Modifanto de adjektivo

Tre interesa estis via prelego.

III) Modifanto de alia adverbo

Vi alvenis *tro* frue.

IV) Modifanto de ajna alia vorto

Nur ŝia patrino komprenis ŝin. Li *nur* laboras nokte.

V) Konektanto de kunordigita oracio

La festo estas komencinta, *sekve* vi ne atingos ĝin ĝustatempe.

VI) Konektanto de subordigita oracio

Li alvenis, kiam malleviĝis la suno.

La ekzemploj I, II kaj III respondas ĉiuj tri al la difino 2. La plej komunaj tipoj de adverboj estas tiuj reprezentataj en la ekzemploj I a) kaj I b), do oni devas rifuzi la restantajn (II kaj III).

En la ekzemploj IV la supozata adverbo modifas ne nur verbon, sed ankaŭ substantivon. Nu bone, tial ke modifi substantivon ne aperas inter la funkcioj enlistigitaj en la difinoj, tio ne povas konsideriĝi kiel adverba funkcio. En kelkaj gramatikoj kaj vortaroj, ĉitiu vortspeco estas nomata *emfaza adverbo*, pro la fakto emfazi la vorton al kiu ĝi referencas. Por rekoni ĉitium vortspecon oni devas rigardi ne ĝian finaĵon, sed nur la funkcion, t.e. se la vorto povas emfazi substantivon ni estos certaj ke ĝi ne estas adverbo, malgraŭ sia aspekto.

Aliparte, en la ekzemplo V la adverbo funkcias kiel ligilo de kunordigita oracio (konjunkcio) kaj ĉitiu sama fenomeno aperas en naturaj

lingvoj (Kp sekve = (A) consequently = (F) conséquemment). Logike, se ĝi estas konjunkcio, ne povas esti samtempe adverbo; do, oni devas elimini ĉitium ekzemplon.

Kaj fine en la ekzemplo VI la adverbo agas kiel ligilo de subordigita oracio, unu el la kazoj antaŭviditaj en la difino de la Webster-vortaro. Kvankam la vorto "kiam" konservas sian tempan signifon, ĝi sole nur estas parto de la cirkonstanco, kiu ja estas reprezentata de la subordigita oracio.

Resume, la ekzemploj II ĝis VI montras vortojn kiuj aspektas kiel el adverboj kaj ne estas reale adverboj, pro kio ni povas nomi ilin falsaj adverboj aŭ simple *pseŭdoadverboj*.

Restus do, la jena kiel unika difino akceptebla:

Adverbo: nevariebla vorto modifanta verbon.

Kvankam ĝi ne estas perfekta, almenaŭ estas pli akceptinda ol iu ajn el la menciitaj. Kompreneble, oni devas insisti ke ĉitium difino implicas realĝustigon de la vortklasifo (7).

RELOKIGO DE MISKLASIFITAJ VORTOJ

Okaze de ĉitium nepra realĝustigo konvenas indiki la erarojn en klasifo de iuj partikularaj vortoj, tiom de naturaj lingvoj kiom de Esperanto.

1) Vortoj konsiderataj kiel adverboj kiuj ja ne estas aŭ metodologie ne konvenas ke ili estu tiaj.

a) Emfazaj vortoj (emfazaj adverboj): eĉ - nur - ja k.c. (ekz IV)

b) Gradigantoj (adverboj de grado): tre - tro - pli - plej - sufiĉe k.c. ekzemploj II kaj III.

c) Aliaj vortoj: ajn - ĉi.

Kvankam ja okazas ke "ajn" estas tradukebla anglen per la adverbo "ever" aganta kiel sufikso (ekz. whoever, whenever, k.c.), hispanen per "-quiera" fleksio de la verbo "querer" (voli) uzata ankaŭ kiel sufikso, kaj francen iomfoje kiel antaŭfiksita verbo "n'importe" (ne gravas). Tial, estas pli internacia kaj logika konsideri ĝin kiel partikulon kun ecoj de afikso pli bone ol kiel adverbon (en PV ĝi aperas kiel vorteto, en PG kiel adverbo kaj en PIV kiel adverba partikulo).

Analoge por "ĉi": kvankam ja okazas ke france ĝi respondas al "ci", kripligita formo de la adverbo "ici", en aliaj lingvoj ĝi ne havas ekzaktan ekvivalenton, egalvalorante pli bone al fleksio de la respondebla demonstra vorto. Malgraŭ la zamenhofa ekzemplo citita en PIV, en la Fundamento ne aperas unu sola uzo de tiu vorteto kiel pura adverbo.

2) Vortoj ne konsiderataj kiel adverboj kiuj ververe devas esti konsiderataj tiel.

a) Substantivoj deklinaciitaj sen prepozicioj.

Akuzativo

(L) Eo domum

(Mi iras hejmen)

Tempa ablativo

(L) hieme

(en vintro)

Kompreneble, ne ĉiam tiuj "substantivoj" estas tradukeblaj per adverbo, kvankam en Esperanto ekzistas granda libero tiurilate (8).

b) Aliaj vortoj: ĉu - jes.

La speciala kazo de "ĉu" kiun kelkiuj gramatikistoj enfakigas kiel demandan partikulon, estas pli ekzakte demanda adverbo (PV ĝin klasifas kiel konjunkcion, PG kiel adverbbon de maniero kaj PIV simple kiel adverbbon).

Pri "jes" PV konsideras ĝin kiel interjekcion en aperta kontraŭdiro kun la difino de ĉilasta vortspeco donita en la sama verko. PIV iomete korektis tion nomante ĝin adverbo-interjekcio.

Ĉitiu relokiĝo de la misklasifitaj vortoj, ne nur havas teoriant intereson, sed ankaŭ praktikan, ĉar ĝi emas eviti kelkajn komplikadojn ĉe la mekanika tradukado de sciencaj aŭ alispecaj tekstoj. Efektive, la programistoj de elektronaj tradukadoj (9) vidiĝis devigitaj forigi la klasikan klasifon de vortoj, formulante sian propran surbaze de iliaj funkcioj. Se oni aspiras ke Esperanto estu pontlingvo por tiuj tradukoj oni devas pensi pri tio meti ordon en la klasifistemo de nia lingvo.

RESUMO

ADVERBOJ KAJ PSEŬDOADVERBOJ
(F. García Blazquez, Karakaso
Venezuelo)

Adverbo, estas eble la plej nekaptebla gramatika nocio kaŭze de sia ega komplekseco. Oni povas ekzempligi ne malpli ol 6 funkciojn malsamajn de ĉitiu vortspeco. En la artikolo oni analizas la ekzistantajn difinojn de la adverbo, kiel ankaŭ ĝiajn malsamajn funkciojn; alvenante al la konkludo ke la plej akceptebla estas: "nevariebla vorto modifanta verbon". Paralele al ĉitiu limigo en la funkcio de la adverbo nepras translokigi iomajn subspecojn al aliaj gramatikaj kategorioj. Tiuj translokigoj estas fundamente tri: a) relativaj adverboj al subjunkcioj, b) emfazaj adverboj al emfazaj vortoj kaj c) adverboj de grado al iu nova vortspeco nomebla "gradiganto". Pro tio pravus nomi pseŭdoadverboj la vortojn supre indikitajn kvankam multe ili similas en sia formo al la realaj adverboj.

NOTOJ

- (1) "La Strukturo de la Oracio" Félix Garcia Blazquez. SR Vol 19 No 1
- (2) "Morfologia Klasifo de Vortoj" Félix Garcia Blazquez SRVol19 No3/4
- (3) "Filozofio de Gramatiko" O. Jespersen Ĉapitro VI
- (4) "Kastillingva Gramatiko" A. Bello Ĉapitro L.
- (5) Efektive, ni ekzameni jenan difinon:
Adverbo: nevariebla vorto modifanta verbon, adjektivon aŭ alian ad-
verbon.
Kiel oni scias la konjunkcio "aŭ" povas havi du funkciojn: a) indiki sinonimecon, kaj b) indiki alternativon. Ĉar verbo, adverbo kaj adjektivo ne estas sinonimoj, ni inferencas ĉiekzemple ke "aŭ" indikas alternativon. Sekve la difino povas malkunmetiĝi en tri jenaj juĝoj:
I) Adverbo estas nevariebla vorto modifanta verbon.
II) Adverbo estas nevariebla vorto modifanta adjektivon.
III) Adverbo estas nevariebla vorto modifanta alian adverbom.
Estante verboj, adjektivoj kaj adverboj esence malsimilaj konceptoj, tiuj tri propozicioj ne povas validi samtempe, do la aludita difino estas forĵetenda.
- (6) Se oni intencas korekti la difinon jene: "adverbo estas vorto signifanta cirkonstancon" ankaŭ oni povas pruvi ĝian netaŭgecon pere de ekzemplo. Efektive, ekzistas vortoj (ekz. "tempo", "maniero", k.c.) kiuj signifas cirkonstancojn kaj ne estas adverboj.
- (7) Vidu la sinoptikan tabelon ĉe "Morfologia Klasifo de Vortoj" artikolo supre citita.
- (8) "La Funkcio de la Derivita Adverbo en Esperanto" D.B. Gregor Esperantologio. Julio 1961.
- (9) "La tradukmaŝino" E. Delavenay. Ĉap. V.

SUMMARY

ADVERBS AND PSEUDOADVERBS (F. Garcia Blazquez, Karakaso, Venecuelo)

Owing to its extreme complexity, adverb is, perhaps, the most inapprehensible grammatical notion. It is possible to exemplify not less than 6 different functions of this word-class. The existing definitions of adverb, as well as its different functions are analyzed in this paper, and one gets the conclusion that the more acceptable definition is "invariable word modifying verb". Simultaneously with this restriction to the function of the adverb it is imperative to transfer some subtypes of adverb to other grammatical categories. This transferrings are basically three: a) relative adverbs to subjunctions, b) intensive adverbs to emphatic words and c) adverbs of degree to a new word-class whose name could be "graduator" (graduating words). In such a virtue it is justifiable the denomination of pseudoadverbs for the above indicated words, however much they resemble in their form to the real adverbs.